

Johann Wolfgang von Goethe, Same	Johann Wolfgang von Goethe, Same tiel	Johann Wolfgang von Goethe, Super montoj regas kviet'	Johann Wolfgang von Goethe, Egalaĵo (Noktokanto de migranto)
<i>tradukita de Pejno Simonono</i>	<i>tradukita de Richard Schulz</i>	<i>tradukita de Poul Thorsen</i>	<i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>
Super montopintoj — silent', tra pinopingo la senvent' spiras sen fort'; arbare la birdoj ekmultas. Pretu, aludas silento pri mort'.	Super ĉiuj montoj Trankvil', Kaj ĉiuj fontoj Sen babil'; Aŭdas vi ne Birdetan ĉirpon arbare. Pensu prepare Pri la pere'!	Super montoj regas kviet', tra l' foliaro nur ventet' spiras kun trem'. Birdoj arbare silentas, se vi atendas, pacas vi mem.	Super ĉio iĝas Kviet', Kaj ne moviĝas Pro ventet' Iu foli'; Silentas la birdoj ĉirkaŭe. Atendu — baldaŭe Ripozos vi.
...	...	...	...

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (*Simon Edward Adrian Payne*, \*1941-12-23).

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (*Rikardo Ŝulco*, \*1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (*Richard Schulz*), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (\*1915-01-07 – †2006-01-30).

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff*, *Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio*, \*1938-11-04) en 1983-01.

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)